

# 星占い

## *Horoskopo*

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

この物語は、釈尊が祇園精舎におられたとき、お説きになったものです。

ある村の娘が、別の村の青年と結婚することになりました。（昔のインドのことですから、もちろん恋愛結婚ではありません。両家の親たちがかつてに決めたのです。）

さて、無事に結納といたしますか、婚約式といたしますか、とにかく前祝いも終えまして、あとは結婚式を待つだけとなりました。（当のご両人よりも、親たちの方があれこれ心配して段取りに追われるのは今でも同じ光景ですね。）

結婚式当日の朝。新郎の父親は、日頃親しくしていた占星術の先生に、日柄を占ってもらおうとしました。ほんとうならば、前もって日柄を占ってもらうのが普通なのですが、なにしろあれやこれやと忙しくて、ついつい後回しになってしまったのです。父親は占星術師を大至急招待して尋ねました。

「先生、今日私達の家でお祝いごとがあるのですが、空の星はめでたい配列になっているんでしょうか？将来はどうなるんでしょうか？是非占っていただけませんか」

Ĉi sube estas la rakonto de Ŝakjamunio, kiu estis en Ŝravasti.

Junulino en iu vilaĝo fianĉiniĝis al junulo en alia vilaĝo. (Ĉar temas pri antikva Hindio, ili geedziĝas ne de libera interamiĝo, kompreneble. Iliaj gepatroj decidis tion sen demandi la intencon de la idoj.)

Nu, fianĉiĝa donaco, aŭ fianĉiĝa ceremonio, aŭ antaŭnupta festo, kiel ajn nomi, finiĝis sen problemo, kaj oni atendis nur la tagon de la nupto. (Same kiel nun, gepatroj zorge preparas diversajn aferojn pli entuziasme ol geedziĝontoj mem.)

Matene de la nupto. La patro de la novedzo deziris peti de la majstro de horoskopo, kun kiu li estis intima, aŭguri la sorton de la nuptotago. Li devintus pli frue peti tion, sed ĉar li estis tiel okupita, ke li nur hodiaŭ venis al la ideo. La patro invitis la majstron al sia hejmo kaj demandis:

“Sinjoro, hodiaŭ mia familio havas grandan festenon. Ĉu la vico de la steloj bonaŭguras? Kiel estos la futuro? Mi kore petas de vi admonon.”

これには占星術師のプライドがいたく傷つきました。「事前にこの私に相談もしないで勝手に日取りを決めてしまいおって。今頃になって聞きに来るとはあきれたもんだ」と心の中で思いましたが、口にはしません。そこで腹いせに、こう占ってやりました。

「今日はとても不吉な星のめぐりあわせです。今日の婚礼はやめた方がいいでしょう。もし強行すればたいへんなことになりますよ。」

新郎の父は占い師を信用してしまいました。その結果、一家は花嫁の村に出かけず、一日中家に閉じこもることにしました。一方、花嫁の村の人々は、大変苦勞して結婚式の宴の準備をして待っていたのに、待ちぼうけをくらうことになりました。

「せっかく日取りを決めて約束を交わしておきながらドタキャンとは！我々を馬鹿にするにもほどがある！」

花嫁の父は怒りのあまり、娘を同じ村の青年にその場で嫁がせることにしました。せっかく調べた宴会を無駄にしたくなかったのです。（ここでもやはり当人の意向は無視されました。もっとも新婦自身、新郎のことはほとんど知らないのですから、どうでもよいことだったのでしょう。）

翌日、新郎の家族がやって来ました。新婦の家族は、「あなた方は礼儀知らずです。急に約束を破るとはどういうことですか。娘にとっては我慢できない程の恥でした。娘をほかの家に嫁にやりました。」と言いました。

Tio ĉi ege vundis lian memfieron. “Li decidis la tagon sen antaŭdemandi min, la majstron, kaj nur nun petas de mi konsilon. Li estas aĉa inerciulo.” Tiel li pensis en sia koro, sed ne diris. Li do aŭguris kun venĝemo la sorton:

“Hodiaŭ la vico de la steloj signas malbonon. Estas bone, ke vi ĉesigu hodiaŭan nupton. Se vi malgraŭ tio plenumas ĝin, venos malfeliĉego.”

La patro de la novedzo fidis lin. Rezulte, la familio ne ekiris al la vilaĝo de la novedzino, sed restis en sia domo dum la tuta tago. Dume la vilaĝanoj de la novedzino kun granda peno preparadis por la nupta festeno, sed tute vane.

“La tago de la nupto estis oficiale decidita, ĉu ne? Malgraŭ tio ili subite nuligis la promeson! Ili ridindigas nin, kio tute ne estas eltenebla!”

La patro de la novedzino tiom koleris, ke li decidis tuj doni sian filinon al junulo en la sama vilaĝo. Li volis ekonomie utiligi la jam preparitan festenon. (Ankaŭ ĉi tie la intenco de la novedzino ne estis demandita. Fakte ŝi mem preskaŭ ne konis la novedzon, do al ŝi ĉio egalas.)

La sekvan tagon venis la familio de la novedzo. La familio de la novedzino diris, “Vi estas malĝentilaj. Kial vi rompis la promeson abrupte? Vi malhonoris nian filinon, kio ne estas eltenebla. Ni edzinigis ŝin al alia familio.”

「私たちは、星占いの結果が不吉だったので大事をとって来なかったのです。それは、娘さんの幸せを考えてやったことです。なんとか娘さんをお渡しください。」

「あんたたちが約束を破ったのがいけないのだろう。ほかの家に嫁にやった娘を今さら連れ戻せるわけがない！」

このように両家が言い争っているところへ、ある賢者がやってきて言いました。

「星の配列で運命を占う愚か者は幸福になれません。実生活で二人が努力することが大切なのです。」

新郎家族はお嫁さんをもらえず、大恥をかいて、悔しい思いを抱きながら、立ち去って行きました。

ここまで語ると釈尊は、弟子達に諭されました。

「このようなことは何時でも何処でも起こりうることです。つまらない迷信にとらわれて大切な決定を誤ってしまうのは愚かなことです。迷信に依存すると不幸になるだけです。世にある様々な占いや超能力の類を信用するのではなく、正しい因果の道理を見なくてはなりません。」

「占相を離れて、正見を修習せしめ、決定して深く罪福の因縁を信ずべし」 (華嚴經)

“*Ĉar la aŭguro de la stelvico estis malbona, ni ne venis al vi por sekureco. Tio ankaŭ utilas al la feliĉo de via filino. Bonvolu, mi petas, doni vian filinon.*”

“*La respondeco estas sur vi, kiu rompis la promeson. Nian filinon, kiu jam edziniĝis al alia familio, ni absolute ne povas doni al vi.*”

Tiamaniere ambaŭ familioj kverelis; tiam unu saĝulo venis al ili kaj diris:

“*Tiu, kiu aŭguras sorton per vico de steloj, estas stulta kaj ne povas fariĝi feliĉa. Grave estas, ke geedzoj klopodas en la reala vivo.*”

La familio de la novedzo, kiu ne povis venigi la novedzinon, povis nur foriri al sia loko, ege hontigita kaj bedaŭranta.

Ŝakjamunio rakontis tiel kaj admonis al siaj disĉiploj:

“*Ĉi tia afero povas okazi iam ajn kaj ie ajn. Enfali en sensignifa superstiĉo kaj erare juĝi gravajn aferojn estas stulte. Dependi de superstiĉo alportas nur malfeliĉon. Vi ne dependu de aŭguroj aŭ misteraj fortoj, kiuj estas ofte renkontataj en la mondo, sed vidu ĝuste la kondiĉan estiĝon.*”

“*Forlasu aŭguron. Ekzercu vin en ĝusta vido, kaj firme fidu la kaŭzecon de bona kaj malbona rezultoj.*” (el la Girlanda Sutro)